



# NILDE

Network Inter-Library Document Exchange

Il presente documento viene fornito attraverso il servizio NILDE dalla Biblioteca fornitrice, nel rispetto della vigente normativa sul Diritto d'Autore (Legge n.633 del 22/4/1941 e successive modifiche e integrazioni) e delle clausole contrattuali in essere con il titolare dei diritti di proprietà intellettuale.

**La Biblioteca fornitrice** garantisce di aver effettuato copia del presente documento assolvendo direttamente ogni e qualsiasi onere correlato alla realizzazione di detta copia.

**La Biblioteca richiedente** garantisce che il documento richiesto è destinato ad un suo utente, che ne farà uso esclusivamente personale per scopi di studio o di ricerca, ed è tenuta ad informare adeguatamente i propri utenti circa i limiti di utilizzazione dei documenti forniti mediante il servizio NILDE.

**La Biblioteca richiedente** è tenuta al rispetto della vigente normativa sul Diritto d'Autore e in particolare, ma non solo, a consegnare al richiedente un'unica copia cartacea del presente documento, distruggendo ogni eventuale copia digitale ricevuta.

**Biblioteca richiedente:** Biblioteca Umanistica Ezio Raimondi  
**Data richiesta:** 22/03/2023 12:27:37  
**Biblioteca fornitrice:** Biblioteca Discipline Umanistiche - Biblioteca Umanistica "E. Raimondi"  
**Data evasione:** 23/03/2023 15:16:27

---

**Titolo rivista/libro:** Lingvokibernetiko  
**Titolo articolo/sezione:** Ne hinde?ropaj trajtoj de la Internacia Lingvo  
**Autore/i:** Pennacchietti  
**ISSN:**  
**DOI:**  
**Anno:** 1982  
**Volume:**  
**Fascicolo:**  
**Editore:**  
**Pag. iniziale:** 92  
**Pag. finale:** 95

E. 237

# LINGVO- KIBERNETIKO      SPRACH- KYBERNETIK

kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la  
IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko


und andere internationalsprachige Akten  
vom IX. Internationalen Kybernetikkongreß

kompilitaj laŭ komisiono de la      herausgegeben im Auftrag der

*Association Internationale de Cybernétique  
(Namur)*

far      von

Prof. Dr. Helmar G. FRANK  
YASHOVARDHAN  
Brigitte FRANK-BÖHRINGER  
*Institut für Kybernetik Berlin & Paderborn*



**gnV** Gunter Narr Verlag Tübingen

## NE-HIND-EŬROP AJ TRAJTOJ DE LA INTERNACIA LINGVO

D-ro Fabrizio PENNACCHIETTI (Italio)

*Profesoro pri Orientalistiko ĉe la  
Universitato de Torino*

Senantaŭjuĝa observanto, kiu legus aŭ aŭskultus bone verkitan IL-an tekston, ne povus eviti la impreson, ke la idioma, kiu fluas sub liaj okuloj aŭ en liajn orelojn, havas markitan fizionomion kaj apartan, karakterizan stilon, kies fundamentoj unuavide ankoraŭ ne klare diveneblas. Por konanto de eŭropaj lingvoj ILo ja ne aspektas fremda, ĉar ĝi prezentas leksike kaj sintakse profilon sendube parencan al tiu de la kulturlingvoj de Okcidento. En ĝiaj trajtoj tamen estas io tre personeca kaj nekutima, kio nerzisteble kaptas la atenton kaj invitas al plua rigardo.

Oni tuj komprenas, ke ILo ne estas koktelo de diverslingvaj vortoj kaj esprimoj kaprice kombinitaj sur arbitra kanvaso, nek asepsa eksterpolado de la eŭropaj lingvoj, nek fine simpla produkto de imito kaj kompromiso. Oni ja perceptas, ke la eklektika lingvomaterialo de tiu idioma kuŝas sur solidaj bazoj de interna kohereco kaj ke ĉiu ĝia trajto, ĉu en la fonetiko kaj en la prozodio, ĉu en la morfologio kaj la sintakso, ĉu fine en la semantiko, kongruas kun la ceteraj por formi proporcian strukturon.

La kialoj de la interna kohereco de ILo estis plurfoje esplorataj kaj, kun malgrandaj opinidiverĝoj, oni alvenis al la komuna konkludo, ke ĝi rezultas el du ĉefaj faktoj: unufanke, ke ILo plene enplantigis en la sulko de specifa lingvotradicio de Eŭropo kaj rifuzas ĉiun fonetikan, gramatikan, sintaksan kaj semantikan elementon, kiu ne konformas al la tipologio de la lingvoj kutime aŭ ofte parolitaj de la kreinto de ILo, L.L. Zamenhof, nome jido, la pola, la rusa kaj la germana; duaflanke, ke ILo reordigas la heredaĵon komunan ne nur al la menciitaj lingvoj, sed ankaŭ al aliaj kulturlingvoj de Eŭropo laŭ rigora kaj konsekvenca sistemo strikte respondanta nek al eŭropaj nek al ekstereŭropaj modeloj. La altgrada reguleco de Esperanto, devenanta de la fakto, ke ĝi estas skemisma planlingvo, kiu tre malmulte cedas al la tendenco, formi siajn vortojn laŭ tro sklava imito de la naciaj lingvoj, ne estas ja komparebla kun tiu de iu ajn lingvo.

Tiaj estas do la reciproke kompletigaj du vizaĝoj de ILo: kiel kreaĵo de centreŭropano, ILo, vole nevole kaj spite al la okulfrapa superrego de la latindevenaj radikoj en ĝia leksiko, alproprigis al si la ĝeneralajn liniojn de la centreŭropaj lingvoj kaj interpretas la realon ĝuste kiel tiuj ĉi ĝin interpretas; sed samtempe, kiel genia produkto de la lingva inĝenierarto, ILo prezentas la lingvomaterialon, kiu ligas ĝin al miljara kulturtradicio, sub formo originala kaj facile alirebla por parolantaj de diversaj lingvoj kaj kun malsama kultura fono.

Ĉefaj karakterizoj de Esperanto estas ĝia vortforma travedbleco kaj ĝia struktura klareco. Tiujn kvalitojn, tre maloftajn en naciaj lingvoj, Esperanto atingas dank' al la fakto ke ĝia strukturo konsistas el la nura interplekto de monemoj (minimumaj sencohavaj unuoj, laŭ la difino de Martinet) havantaj nevarigeblajn signifantojn. Pro tio, kiel prave rimarkis M. Duc Goninaz, ne taŭgas por Esperanto la nocio de morfologio, sed male tiu de monemologio.

El tio sekvas, ke la reguloj de Esperanto apartenas nur al la semantiko (kiamaniere esprimi certan ideon per monemo aŭ aro da monemoj) aŭ al la sintakso (laŭ kia ordo envicigi la monemojn interne de vorto kaj la vortojn interne de frazo). Oni povus dedukti, ke ĝuste pro tio, ke la semantiko kaj la sintakso de ILo respegulas la semantikon kaj la sintakson de jido kaj de la pola kaj rusa lingvoj, ankaŭ ĝiaj reguloj devas esti parencaj al la reguloj de tiuj lingvoj. Tiu argumento respondas al la vero nur en la senco, ke en Esperanto la manko de morfologio kaj de fleksieco estis tiel mime-tisme kaŝita fare de la Aŭtoro kaj tiamaniere alkonformigita „al la spirito de la lingvoj eŭropaj“ — kiel konfesas Zamenhof mem — ke la parolanto de Esperanto, precipe se eŭroplingvano — „eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo“.

Tamen en neniuj el la eŭropaj lingvoj, al kiuj ILo pli similas semantike kaj sintakse, la monemoj, kiuj konsistigas la vortojn, estas sensanĝaj kiel en Esperanto. Male, pro la flekcia karaktero de tiuj lingvoj, ili plej ofte kunfandiĝas, modifiĝas kaj prezentas plurecon da formoj kaj paradigmoj, postulante tial la „studon de la formoj“, nome morfologion.

Aldone al tio, oni konstatas, ke en neniuj eŭropa lingvo la diversaj vortspecoj distingiĝas unu de la alia tiel klare kaj nemisrekoneble kiel en ILo, kiu, foje pleonasme, foje signifoplene, provizas ĉiun vorton per aparta monemo (aŭ nul-monemo) indikanta ties rolon en la frazo. Tiu ĉi lasta karakterizo de ILo, kiu altgrade faciligas la interkomunikadon per la tuja rekonebleco de la vortfunkcioj, trovas paralelaĵon nek en la eŭropaj, nek en la ekstereŭropaj lingvoj. Estas vere, ke en pluraj lingvoj la substantivoj laŭforme distingiĝas de la verboj. Plej ofte tamen la diferenco inter substantivo kaj adjektivo, kaj inter adjektivo kaj adverbo ne estas klare markata kaj oni devas sin turni por ilin distingi al la signifo kaj al la vortordo.

Inter la ne-hindeŭropaj lingvoj, la distingo inter substantivo kaj adjektivo estas sufiĉe bone garantiata en la semidaj lingvoj, kie nekontinuaĵoj monemoj, aŭ pli bone di-

rite, skemoj de la interna flekcio, tipa de tiuj lingvoj, signalas, ĉu temas pri tiu vortspeco aŭ pri la alia. Sed, memkompreneble, en neniu semida lingvo tia distingo estas tiel regula kiel en Esperanto.

Kun ILo la semidaj lingvoj havas plie la komunan trajton, akordigi la adjektivon kun la koncerna substantivo, kaj la araba esprimas krome la kategorion de „akuzativo“ de la nedifinitaj substantivoj kaj adjektivoj ne havantaj dualan finaĵon per la monemo -an, kiu parte koincidas kun la akuzativ-monemo de Esperanto. Alia semida paralelaĵo kun ILo estas la ekzisto de unuforma difina artikolo kaj la foresto de nedifina artikolo en la hebrea kaj la araba. Krom tio, ĉiam kiam evidentiĝas proksimuma paralelaĵo inter semida lingvo kaj Esperanto, tia paralelaĵo troviĝas ankaŭ en la hindeŭropaj lingvoj konataj de la Aŭtoro de ILo, dank' al la tipologia simileco inter la du lingvofamilioj, la semida kaj la hindeŭropa. Ĝenerale oni povas traduki laŭvorte semidan tekston en sufiĉe kompreneblan Esperanton.

Se malgraŭ ilia ekstrema fleksieco la semidaj lingvoj, almenaŭ en kelkaj aspektoj de la sintakso, similas al la ekstreme neflekcia ILo, la neflekciaj lingvoj eŭropaj kaj ekstereŭropaj prezentas male tute alian vortordon kaj tre malfacile estas laŭvorte tradukeblaj per Esperanto. Similaj al Esperanto pro la fakto, ke iliaj monemoj estas absolute sensanĝaj kiel tiuj de ILo, estas la izolaj lingvoj, kiel ekzemple la ĉina, la vjetnama kaj la indonezia. Tiuj lingvoj havas tamen tre limigitan kapablon konstrui vorton per la kunmeto de pluraj monemoj, kiel okazas kutime en ILo.

El la vidpunkto de la dinamiko de vortfarado kaj derivado ILo similas tial pli al la aglutinaj lingvoj ol al la izolaj. Sed en ĉi tiuj lingvoj, ekzemple en la turka kaj en la hungara, la afiksaj monemoj ŝanĝas sian formon por krei vokalan aŭ konsonantan harmonion kun la antaŭiĝantaj monemoj, kio tute ne okazas en ILo. Alia diferenco inter la aglutineco, nome la tendenco enpakigi plurajn monemojn en unu vorton, de Esperanto kaj la aglutineco de la turka kaj similaj lingvoj, staras en tio, ke ĝi ne puŝiĝas en Esperanto ĝis la grado, utiligi kiel afiksojn monemojn tiajn, kiaj la negacio (kp. turka *iste-me-di-m* „mi ne volis“ = *vol-ne-is-mi*), la demanda adverbo (kp. *oku-yacak-mi-siniz* „ĉu vi legos?“ = *leg-os-ĉu-vi*), la kondiĉa subjunkcio (kp. *gel-se-m* „se mi venus“ = *ven-se-mi*), la kopulaj kaj modaj verboj (kp. *yorgun-du-k* „ni estis lacaj“ = *lac-(est)is-ni*; *söyle-n-ebil-ir* „ĝi povas esti dirita“ = *dir-iĝ-pov-as*) kaj la personaj pronomoj. Nek oni povas en Esperanto uzi kiel ĉefelementon demandan pronomon (kp. turka *ne-ci-siniz* „kio estas via profesio?“ = *kio-ist-vi*; *ne-re-li-siniz* „el kiu lando vi estas?“ = *kio-ej-an-vi*).

Kiel oni vidas, la procedo, formi vortojn per la kombino de sensanĝaj monemoj, kaj la ordo de sinsekvo de tiuj konstruelementoj konformiĝas en Esperanto pli multe al la spirito kaj al la kutimoj de la eŭropaj flekciaj lingvoj ol al tiuj de la neflekciaj lingvoj, ĉu eŭropaj, ĉu ekstereŭropaj. Kvankam principe pli simila al tiuj ĉi lastaj, ILo adaptas do sian aglutinecon al la kondiĉoj de la eŭropaj lingvoj, precipe centreŭropaj. Ĝi distanciĝas krome de la aglutinaj lingvoj en tio, ke ĝi ne akceptas la trajtojn, kiuj normale karakterizas la tipologion de la aglutinaj lingvoj, kiel ek-

zemple la manko de akordado inter substantivo kaj adjektivo, la uzo de postpozicioj kaj la manko de propre diritaj relativaj subpropozicioj.

Plie, la afiksaj monemoj de ILo, kvankam apartenantaj, kiel la afiksaj monemoj de la aglutinaj lingvoj, al tre limigitaj inventaroj, povas, kun la escepto de la vortfinaj monemoj, esti uzataj memstare (se al ili aldoniĝas la vortfinaj monemoj), vidu et-a, dis-a, ul-o, ar-o, per-i, iĝ-i k.t.p.; kaj tio konstituas alian grandan diferencon inter ILo kaj la aglutinaj lingvoj, kie tiu fenomeno tute ne eblas.

Evidentiĝas do, ke la interna strukturo de ILo povas prezenti kelkajn aspektojn, kiuj troviĝas nur en lingvoj izolaj kaj aglutinaj (nome ne-hindeŭropaj), sed ankaŭ ke tiuj aspektoj ne rezultas el la imito de ne-hindeŭropaj modeloj. Ili estas male tute hazardaj. La kompakteco de la radikoj kaj afiksoj de Esperanto kaj ilia dinamika kombinebleco originas fakte el la drasta maldensigo, kiun Zamenhof genie plenumis en la arbitra kaj malorda plureco de formoj de la eŭropaj lingvoj de li konataj, kaj el la redukto de tiuj formoj al la nombro plej konvena por facila kaj efika internacia komunikado.

La interna kohereco de Esperanto klariĝas do per tio, ke ĝi kapablas harmonigi la postulojn de struktura simpleco, necesajn por vasta internacia uzo, kun la konservado de preciza tipologia stampo, nome tiu de la germanaj kaj slavaj lingvoj de centra Eŭropo. Tiu stampo ligas Esperanton kun tuta historio de lingvaj spertoj, maturiĝintaj dum miljaroj, kaj garantias al ĝi ĝian nunan kaj estontan vivecon.

#### Literaturo:

- BAUSANI, A.: "Historia panoramo de interlingvistiko kaj lingvistika valoro de Esperanto. IV", en 'Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (CH) 85 1977, p.1-6, §853.
- DUC GONINAZ, M.: "Bazaj problemoj de la analizo de Esperanto", en 'Lingvistika Simpozio', Kumrovec (YU) 1975, p.153-170.
- PIRON, C.: "L'Esperanto: lingua europea o asiatica?", en 'Quaderni K5 (L'Esperanto, IEF, p.7-8) 1978.
- RIZZO, P.: "Sesdek jaroj", Pisa 1979, p.1,17.
- WARINGHIEN, G.: "Lingvo kaj vivo - Esperantologiaj eseoj", La Laguna de Tenerife 1959, p.102-114.
- ZAMENHOF, L.L.: "Fundamenta Krestomatio", 17a eld. Rickmansworth 1969, p.234.